



PENSEO

N-ro 301

nov. / 2016

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 27-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



Leciono

mi cintris vatan firmamenton
por fari venton ĉielarkoj garnaj.
falo! forgesis mi ŝtonponti
la valon inter piedoj la karnaj.



2013.09.21

la luno perdis sian rondon

persistis pluvo tutan nokton
kaj lavis nigron korvan blanka,
sed mia roĝo en aŭtuno
dezerte restas akvomanka.

2013.09.11

konfuza degenero

de simioj al homaro,
degenero ne nur estas simpla kiel defalo folia.
simioj leĝon del ĝangalo ne pretendas justa;
homaro taksas masakradon korfavoro dia.



2013.07.15

karmo

ŝtormo marigis urbojn kaj vilaĝojn.
nun fiŝmanĝintoj estas manĝataj de fiŝoj.
ŝafoj kaj bovoj pi-kredantaj je vegetarismo
montpinte festis savon. tondro! ili fariĝis
salmisoj.

2013.07.14

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Turmento

El latina fonto: invidia—
mise vidi — envio
blindas pro kultivo
de manko de memamo.

Enviulo malamas
alies feliĉon;
lia rigardo dronas
en siaj malvarmaj
labirintoj mem.

En la Dia Komedio
kaj ĉe l' tragedio de l' vivo
al enviulo la martiriĝo
pro kudritaj okuloj:
ili ne rajtas vidi lumon.

Juiz de fora, 29/09/2016

Fajneco

Rozkolora plumaro
trembrilas sur la placo;

plumiĝas printempo:
fajna delikateco
de dia Pentristo.

Juiz de fora, 15/10/2016

Luno de Leblono

Multajn lunojn mi travivis...
Baroka luno ĉe Minoj,
levita hostio luma
super la silento pia
de l' tegmentoj de l' preĝejoj
en Ouro Preto, Mariana ...

Kaj frida luno de Manhatan
solecon estas verŝanta
sur brakojn de l' Libereco ...

Sed ĉi tiu ruĝa luno, kiun,
de l' Leblono Belvidejo,
mi kontemplas surgenu:

luno per oro kovrita,
nuda, tutnuda fajre,
levita pasio, fetiĉo...

Tia luno, ekvilibristo,
ĉina balono sorĉanta,
estas, kiel sunorgasmo:
fajro sur ora maro!

Poemo tradukita la 17-an de Oktobro 2016.

Juiz de Fora – Minoj - Brazilo

Mori (Usono)



Aforisme (16)

Nur tiu vere ĝojas
kiu vivas nude,
sen masko,
la vivo de l' ceteraj
estas granda fiasko.

La vivo ne estas
kvazaŭ batalo,
vivu la vivon kun ĝoj'
sen kialo.

Saĝulo estas
l' mastro de sia sorto,
la ceteraj vivas sklave
ĝis la morto.

Por amikeco
kaj paco
necesas sufiĉe da
distanco.

Kiel utilas telefono
se ĝin posedas nur
unu persono?

Manko de saĝ'
en la kap'
ne kaŝeblas
per pompa ĉap'.

Kiu venkas
la timon de fiasko,
sukcesas en
kiu ajn tasko.

Malbona amiko
estas kiel hundo,
kiu de vi ricevas
oston
por aliul' skuas
la voston.



Vi ne estas guto
en la oceano,
vi estas oceano

en la guto,
 vi estas la tuto.

 Semu la semon de am'
 en la koro,
 rikoltu amon ĉie
 sur la tero.

 En demokratio
 voĉdono,
 pavas la vojon por
 fripono.

 Kie ajn regas
 grav-nuloj
 tie estas prizono
 de grandaj pensuloj.

 Estu instrumento
 de ĝojo
 sur via vivo-vojo.

 stulteco de homo
 estas radiko de l'
 homa problemo!

 Kapitalistoj kiuj vivas
 surdorse de laboruloj,
 estas la plej grandaj
 malhonoruloj.

 Nur stultuloj
 kaj muloj
 ne lernas
 de aliuloj!

 Novkapitalismo:
 novkanibalismo.

 Laboru
 por la feliĉo
 komuna
 se vi deziras esti
 kontraŭ mizer'

imuna!

 Kie ajn regas etuloj,
 homoj suferas laborante
 kiel muloj.

 Ĉie en la mondo,
 homoj
 estas parto de l'
 sociaj problemoj!

 Grandeco de
 malgranda persono
 dependas de
 grandeco de lia mono.

 Ju pli grandas
 via kor' kaj penso,
 des pli granda estas
 via grandeco.

 La plej ridindaj
 personoj
 estas malgrandaj uloj
 sur la altaj postenoj.



Cezar (Germanujo)



Sonĝo en sonĝo

En sonĝo mi eksonĝis,
 ke sonĝas mi en val'.
 Mi en la sonĝon plonĝis
 rokoken post la fal'.

 La homoj tie dancis,
 en park' dum karnaval'.
 Ĉe damoj mi bonŝancis

ĝis krakis pafa knal'.

Mi tuj en puton saltis
ensonĝe en la val'.
El lago mi forsaltis,
sed jam sub luna pal'.

Sed kiam mi min vidis,
mi ploris pro la ŝok'.
Mi, kiu songojn fidis,
fariĝis nun ezok'.

Nur gastoj surtere

Ja eble estas lasta foj',
ke mia man' sur via kuŝas,
ke mi, migranto sur la voj',
do viajn karajn lipojn tuŝas.

Vi ridas hele kaj kun ĝoj'
kaj tiom softe min karesas.
Sed mi, migranto sur la voj',
la timon mian nun konfesas.
Ni estas gastoj nur sur Ter',
eĉ, se ni kiom ajn feliĉas.
Pro Morto kaj pro Lucifer'
plej rava amo ja finiĝas.

Ne por eterne estas am',
finiĝos ĉiu kiel ĉio.
Kaj ĝuste tial, kara dam',
ni amu nin do kun pasio.

Ja eble estas lasta foj',
ke mia man' sur via kuŝas,
ke mi, migranto sur la voj',
do viajn karajn lipojn tuŝas.

Takashi ITO (Japanujo)



senmova manto ...

bastono-pinto ...
sen sorĉo kunvokiva

libelo venas

kelke da griloj
iel tiel ĉirpadas
ho, pluvonokto

la duonluno ...
mia ekzistado el
song-material'

lante spirante
per ŝtelmovaj flugiloj
jen papilio

senmova manto
sur la fenestro-vitro ...
ho! lunleviĝo



Ángel Arquillos (Hispanujo)



Vi diras, mi faras nenion,
kaj jen mi respondas:
ĉiutage mi amas,
mi pensas,
mi vivas,
mi mortas,
mi ridas,
mi ploras,
mi ĉiutage solas,
sopiras,
avidas,
angoras,
fojfoje mi ankaŭ feliĉas,
insiste vi diras,
mi faras nenion.
Se vi malkonfidas,

demandu pri mi al la vento,
 al izola stelo,
 demandu
 pri mia sufero,
 pri ĉio,
 pri varma bruego
 aŭ trista silento,
 demandu
 pri mia soleco
 pri amo,
 malamo,
 demandu
 estas mia peto.
 Ne diru mi faras nenion,
 mi kantas
 kiam vi silentas,
 mi ridas kiam vi forestas,
 mi ploras
 kiam vi suferas,
 neniam plu diru
 mi faras nenion...

10 nov 2007

Mi perdis mian animon,
 ĝi foriris dum la dormo
 kaj pro bru' de granda ŝtormo
 mi ne aŭdis ĝiajn paŝojn.
 Tamen mi daŭre vivadas
 kaj sentas al mia koro
 kiu lante, sed kun forto
 ĉe mia brusto batadas.
 Mi perdis mian animon,
 eble ĉar mi ne plu havas
 esperon de nova vivo,
 sed mi tute ne bedaŭras...,
 ĉar sen animo la vivo
 estas afero normala.
 Mi havas plurajn amikojn
 kiuj tra la mond' vagadas
 kun espero, sed kun timo
 pro la minacoj konstantaj.



18-10-16

Ŭel Roŝa (Brazilo)



Tradak'

Mi 'stas tradukisto.
 Volas traduki .
 Vee kvazaŭ Kristo.
 Ride, sen kaduki.

Mi 'stas tradukisto.
 Volas traduki.
 Kun mia mema ŝvito ...
 Ho ne, sen volapuki!

Tradukisto mi estas.
 Skribbatu sur la frunto.
 Oni suferes festas.
 Ja kun ŝvito kaj kun bunto.

Traduke.
 Fundmerge ...
 Elsuke.
 Asperge ...

Jen mi laŭ
 Traduk'.
 Miaŭ!
 Peruk'.

Jongsop Parko (Sudkoreio)



La Esperantaj Homoj

Rigardu verdastelojn!
 Ne en ĉielo nigra,
 Sed en la koroj amoplenaj.
 Parolu dolĉe!
 Ne en la dialektoj,
 Sed lingve la komuna kaj neŭtrala.
 Svingu la standardon forte,
 Ne por almarŝi baltalkampon,
 Sed por deklari pacon.

Kaj, dancu gaje!
 Ne tangon de allogo kaj volupto,
 Sed Ganggangsŭole-on* de harmonio kaj
 egalto,
 Prenante manojn de najbaroj.

**Ganggangsŭole : Korea tradicia grupdanco, kiu grupanoj dancas rondirante, kunprenante manojn en manoj.*

2016. 10. 04

Manŭel Rovere (Italujo)



SE MI ESTUS...

(kantteksto)

Se mi estus... se mi estus fajro, bruligus mi la tutan mondon kaj kovrus mi, per nigra, densa cindro, la tutan grundon. Se mi estus... se mi estus akvo, inundus mi la tutan teron, dronigus la homaron mi en putran, profundan maron. Se mi estus... se mi estus vento, mi disbategus ĉiujn florojn, kaj svarmi lasus mi ne plu parfumojn, ne plu kolorojn. Se mi estus... se mi estus frostto, mi glaciigus ĉiujn korojn, por, ke neniu sentu plu la ĝojojn aŭ la dolorojn.

Ĉar malŝatas mi ĉi fian mondon kie mankas justeco, libero kaj pereas, ve!, ĉiun sekundon, virinoj, beboj pro malsato, mizero. Honesteco foriris el mondo kaj pri paco perdiĝis l'espero. De malamo altiĝas la ondo, ĝi etendiĝas jam sur la tutan teron kaj preskaŭ mankas Amo!

Se mi estus... se mi estus leĝo, forviŝus mi la dikajn kodojn kaj kiel devon lasus mi tutsimple la "dek ordonojn".* Se mi estus... se mi estus lingvo, mi farus tuj, ke la vortaro de Esperanto iĝu l'komprenilo por la homaro. Se mi estus... se mi estus homo, mi volus vivi nur por Amo kaj vokus ĉiujn, kun frateca sento, "samideano". Jes mi estas... ja mi estas homo, la vivon donis al mi Dio nur por, ke mi

kun ĉiuj kunestadu en harmonio.
 Kaj mi strebas, ke la verda stelo iĝu la plej honora ornamento,
 estu la esperantista celo
 "la homaron kunligi per Amo".
 Ĉiuj ni volas, ke l' verda stelo iĝu la plej honora ornamento,
 ni batalu por la sankta celo
 "la homaron kunligi per Amo".
 Ĉar, fine, venkos Amo!

**La "dek ordonoj" estas la fundamenta leĝo de la Kristana Religio.*

Guozhu (Ĉinujo)



Soneto al Amikoj

Hodiaŭ por mi estas dato bela,
 pro esperantisteco sesdekjara,
 kun verda koro dumvive fidela.
 Mi donas listojn pri laboro fara.


Mi verkis kaj tradukis senripoze,
 devkonscie per kaj por Esperanto,
 kultivis ĝardenon verse kaj proze,
 ĝis la jubileo de diamanto.

Multaj intimaj amikoj trans maro
 salutas okaze de l' jubileo.
 Mi kore dankas pro la solidaro,
 kiu kunigas nin per sam-ideo,

pro via zorgo al peno fruktdona,
 al dulingva tajpad' plurmiliona!

2016-10-22

Elsa Sylvie Marinelli (Usono)




La libereco de la sufero...

Ĝenerale, profundan Amon oni kaŝas
 Sub la masko de l' amikec' antaŭ ĉio,
 Sen ĉesi l' esploron de la persono,

Por kompreni la erarojn farite per ni,
Kaj, kiam la silent' alvenas sen brue
Ni plu ne memoras eĉ unu vorton de malamik'
Sed la profundaj bruoj de silento de nia
amik'...

Bone sciante, ke la Ĝojo alvenus poste,
Post ĉesado de suferiganta pluv' en la viv'

Jadranka Miric (Serbujo)



Aŭtune

Surteriĝis kolombo blanka
sur trotuar' ora tapiŝo,
kvazaŭ parteton serĉanta
de folioparo falanta.

Flavaj folioj kaj iuj
malhelruĝaj koloroj
vente portantaj,
kiel suno arda,
okcidente subiranta,
sian lastan dancon dancantaj.
Dume vesperiĝas.

Aŭtuna rikolto

Frua aŭtuno.
Maturiĝaj vinberoj.
Birdoj sur vitoj.

Senĉese pluvas.
Ĉaro plenas de maiz'.
Nebul' altiĝas.

Malvarma maten'.
Betuloj senfoliar'.
Aŭdiĝas kukul'.

Falas kaŝtanoj.
De post pluvo suniĝas.
Promenas homoj.



06/10/2016

Gao Shi (ĉ.704? - 765?)

Al vicperfektoj Li kaj Wang degradite sendataj al Xiazhong kaj Changsha

Kion vi sentas hodiaŭ ĉe nova disiĝo?
Haltigante ĉevalojn ni vinpokalon prenas.
Simioj de Wu-kanjono vekriis kun larmoj.
Kun kelkaj leteroj sovaĝ-anseroj revenas.

Aŭtuna velo distas sur acera rivero.
Apud urbo Baidi grandaĝaj arboj maldensas.
En sankt-epoko multas favoraj pluvo rosoj,
tial pro portempa disiĝo triston ne pensas.

Elĉinigiis



Guozhu (Ĉinujo)

2016-10-10

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO SEPA

Kompetentaj imperiestroj kaj reĝoj

§07-05

En la regno de Zheng vivis mirinda
sorĉisto nomata Ji Xian. Li povis antaŭdiri la
vivon kaj la morton, la gajnon kaj la perdon, la
feliĉon kaj la malfeliĉon, la longecon kaj la
mallongeco de la vivo, kun supernatura
precizeco je la jaro, la monato kaj eĉ la dato.
Ĉe la ekvido de li la homoj de la regno Zheng
turnis la dorson kaj time forkuris de li (por
eviti, ke li antaŭdiru al ili la malbonon —
trad.).

Liezi iris vidi lin kaj estis mirigita de lia

arto. Reveninte li diris al sia instruisto Huzi:

“Majstro, mi ĉiam pensis, ke via atingo en la Taŭo estas perfekta, sed mi nun ekscias, ke ekzistas iu kun atingo ankoraŭ pli perfekta.”

“Ĝis nun mi instruis al vi nur la supraĵon de la Taŭo, ne ĝian esencon,” diris Huzi. “Ĉu vi pensas, ke vi jam vere posedas la Taŭon? Sen virkoko, kiel kokino povus demeti fekundiĝintajn ovojn? Kiam vi elmontris al la mondo viajn supraĵajn sciojn pri la Taŭo kaj penis kredigi ilin al la popolo, tiu sorĉisto certe povis legi vian supraĵecon en via fizionomio. Provu venigi lin ĉi tien kaj lasu al li legi mian fizionomion.”

En la sekva tago Liezi venis kun la sorĉisto por vidi Huzi. Kiam ili eliris el la domo, la sorĉisto diris:

“Ve! Via majstro baldaŭ mortos. Li vivos ne longe — ne pli ol tagdekon. Mi vidas ion strangan sur lia vizaĝo. Li aspektas kiel malsekiĝinta cindro.”

Liezi eniris kaj rakontis al Huzi, kion li ĵus aŭdis de la sorĉisto, kun larmoj falintaj sur la robon.

“Ĵus mi montris al li mian kvietecon de la tero, nek kun viveco, nek kun senviveco. Probable tio, kion li vidis, estis miaj haltigitaj naturaj funkciadoj. Provu denove venigi lin ĉi tien.”

En la sekva tago Liezi refoje venis kun la sorĉisto por vidi Huzi. Kiam ili eliris el la domo, la sorĉisto diris:

“Feliĉe via majstro renkontiĝis kun mi. Nun li fartas multe pli bone. Li ricevis ĉiujn signojn de la vivo. Mi vidis, ke liaj naturaj funkciadoj revigliĝis.”

Liezi eniris kaj rakontis al Huzi, kion li ĵus aŭdis de la sorĉisto. Huzi diris:

“Ĵus mi montris al li la energiecon de la naturo, liberan de zorgoj pri la famo kaj profito, kun vivoforto leviĝanta de la kalkanoj. Probable tio, kion li vidis, estis miaj naturaj funkciadoj en plena aktiveco. Provu denove

venigi lin ĉi tien.”

En la sekva tago Liezi ankoraŭfoje venis kun la sorĉisto por vidi Huzi. Kiam ili eliris el la domo, la sorĉisto diris:

“Via majstro estas en tranco. Mi ne povas legi lian fizionomion. Atendu ĝis li refariĝos mormala kaj mi relegos lin.”

Liezi eniris kaj rakontis al Huzi, kion li ĵus aŭdis de la sorĉisto. Huzi diris:

“Ĵus mi montris al li la perfektan harmonion, en kiu neniam signoj vidiĝis. Probable tio, kion li vidis, estis miaj naturaj funkciadoj en absoluta ekvilibro. La loko, kie fiŝegoj kolektiĝas estas abismo; la loko, kie akumuliĝas senmova akvo, estas abismo; la loko, kie fluanta akvo turniĝas, estas abismo. Ekzistas naŭ specoj de abismoj kun malsamaj nomoj. Mi montris al li nur tri el ili. Provu denove venigi lin ĉi tien.”

En la sekva tago Liezi ree venis kun la sorĉisto por vidi Huzi. Sed, apenaŭ li alvenis, li perdis sian trankvilon kaj forkuris. Huzi diris: “Postkuru lin!”

Liezi ne kuratingis la sorĉiston. Kiam li revenis, li diris al Huzi: “Li malaperis. Li malaperis. Mi ne povis kuratingi lin.”

Huzi diris: “Ĵus mi montris al li mian identigon kun la primitiva stato de la naturo. Mi fleksiĝe konformigis min al liaj deziroj kaj komplete konfuzis lin. Mi tiam estis kvazaŭ folio en la vento aŭ riverakvo sekvanta la fluon. Jen kial li forkuris.”

Aŭdinte tiujn ĉi vortojn Liezi konvinkiĝis, ke li ankoraŭ ne vere komencis lerni la Taŭon. Li revenis hejmen kaj enfermis sin en sia domo dum tri jaroj. Li kuiris por sia edzino, manĝigis porkojn tiel zorge, kiel li nutris homojn, kaj havis nenian specialan preferon por ĉiu el la estaĵoj en la mondo. Li forĵetis ĉion supraĵan kaj artaĵan kaj revenis al la simpleco de la naturo. Li restigis sian korpon kiel bulon da tero en la mondo, sin tenante je sia origina memo ĝis la fino de sia vivo.

§07-06

Ne estu la mastro de famo.
 Ne estu plena de ruzaĵoj.
 Ne estu okupita je mondecaj aferoj.
 Ne estu la posedanto de inteligenteco.

§07-07

Spertu la senfinan Taŭon kaj vagadu en la regno de la nenieco. Ĝuu tion, per kio la naturo dotis vin kaj ne pensu, ke vi tion posedas — ĉio estas nur nenieca.

La perfekta homo havas menson, kiu estas kiel spegulo. Ĝi nek akceptas, nek sendas ion ajn. Ĝi reflektas objektojn, sed ne retenas ilin. Tial li povas sukcese agadi sen eluzi sian menson.

§07-08

La reganto de la Suda Maro estas nomata Konfuzo; la reganto de la Norda Maro estas nomata Senordo kaj la reganto de la Centra Regiono estas nomata Ĥaoso. Konfuzo kaj Senordo ofte renkontiĝas en la lando de Ĥaoso, kiu ilin varme gastigas. Ili volis reciproki lian komplezon kaj diris al si:

“Ĉiu havas sep aperturojn, por aŭdi, vidi, manĝi kaj spiri. Sed nur Ĥaoso havas neniun el ili. Ni do provu bori kelkajn por li.”

Ili komencis bori unu aperturon en ĉiu tago, kaj en la sepa tago Ĥaoso mortis.



Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Guozhu (Ĉinujo)



Je Mia Diamanta Jubileo

— laŭ ĉinesko Shuidiaogetou*

Post pen' senlaca
 kaj diligenta,
 post hardado neĝa,
 pluva kaj venta,
 venas jubileo
 verde diamanta
 kaj monumenta.
 Lukt' sesdekjara —
 rekord' eventa.

Tempaso
 ŝajnas nur
 momenta;
 sed har-nigro
 jam fariĝis arĝenta.
 Kun brava fervor' mi
 marŝu kun obstino
 sur voj' senpenta,
 Ĉiam al nova
 task' eminenta!



2016-10-22

*Shuidiaogetou (*Preludo de Akva Melodio*): cxina fiksforna poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj respektive de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55 silaboj

laux rimarangxo de xa, xa, xxa, xa / xxa, xa, xxa, xa
(x = senrima)

Vejdo (Ĉinujo)



Serĉado por saĝo

el rakontoj de Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

La reĝo
aŭdis ke lia
regnan' Afanti estas
saĝa kaj multescia
kaj simpatia.



La reĝo
post longa vojaĝ'
lin vizitis kaj ĉuis:
“De kie jen via saĝ'
venas al kap-kaĝ'?”

Afanti
respondis sprite:
“Mi ĝin serĉadis ĉie
malfacile kaj ŝvite,
kaj senhezite.”

“Ĉu trovi
ĝin oni povas?”
“Jes certe, via moŝto!
Vi hojon fose movas
kaj ĝin ja trovas!”

La reĝo
ekĝojis pro dir'

lia kaj pensis en si:
“Oni nomas per delir'
min malsaĝa vir' .

Se trovos
mi saĝon vere,
mian kapon plenigos
mi ja per ĝi prefere
kaj tre fiere,

kaj krome
da ĝi kestojn du
mi kaŝe konservos por
mia fil' por onta ĝu'
kaj dispono plu.”

Post tio
la reĝ' ordonis
lakeon preni hojon,
sekvi l' viron proponis,
ĉevalon spronis.

Post longa
iro peniga
ili haltis ĉe terpec'
sovaĝa, senlirika
kaj sentrafika.

Afanti
demetis jakon
kaj petis al la reĝo
forigi sian frakon,
eki fos-hakon.

Fosadis
longtempon ili,
plenaj de granda ŝvito,
sed ne trovis tie ĉi
ion de magi' .

“Kial mi
saĝon trovis ne?”
ĉuis la reĝ' kolere.
“Malpacienca ne tre,

fosu re kaj re!

Ni plugu
teron aŭtune,
semu saĝon printempe,
jen rikoltu ĝin kune.
Ni fosu nune!”

Demandis
la reĝ’ scivole:
“Ĉu l’ saĝ’ dirita de vi
'stas gren’ kreskinta ore
en ter’ frivole?”

“Ja prave!”
diris Afanti,
“Se ne estus gren’ ĉe vi,
vi volus ĝin serĉanti
sen aroganti?”

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Fjodor Kuzjminskij

Briko

Antaŭe mi tre ne ŝatis proverbon “Kion faras Dio, ĉio estas al pli bona”. Tamen oni elpensis proverbojn por tio, ke respeguli realecon.

Tiam mia aĝo estis 19 jaroj.

En malserena oktobra vespero mi revenis el instituto al hejmo. Se estis libera minuto, do mi ŝatis promeni de metroo ĝis hejmo laŭ malnovaj moskvaj kortoj, kiuj estas apud brua kaj tumulta avenuo de Paco.

Estis tia sama aŭtuno, kiun gloris poetoj de ĉiuj tempoj.

Mi tre ŝatis tian aŭtunon. Finiĝis varmo, verdan koloron ŝanĝis la flava, koro pleniĝis per ia dolĉa malgajo antaŭ io, antaŭ iaj eventoj,

kiuj nepre devas okazi. Aŭtuno estas tempo por ke sumigi rezultojn kaj esperojn por estoneco. En ajna okazo por mi. Ĉu verŝajne pro tio ke precize aŭtune mi naskiĝis?

Mi iris enspirante cigaredan fumon kaj aromojn de aŭtuno. Mi ne pensis pri iu speciale. Mi simple iris laŭ kortoj.

Ho, niaj kortoj, kortoj... Kial vi estas tiaj afablaj tage kaj tiaj malafablaj en krepusko...?

Ili estis triope...

Ial kiam ili estas triope, kaj mi estas sola, apude estas neniu. Ĉirkaŭiri ilin mi ne povis, sed returniĝi reen mi ne volis. Mi ĉirkaŭrigardis. Spite al mi estis neniu preteriranto, sed ankoraŭ estis lume. Ne montrante aspekton, ke mi pensas pri iu malbona, mi ekmovis al ilia flanko.

Tri junaj sovaĝkreskaj organismoj kun vizaĝoj parolantaj pri tio, ke heroon Batman ili scias pli bone ol Ĉackij, vigliĝis. Jen estas mi, ĝentlemanoj, ĉiam por vi. Mi estas ne Arnold Schvarznegger kaj ne Brus Li, kaj kun okulvitroj...

– Ĉu vi havas cigaredon, bubo? – diris unu el la individuoj.

Nu certe tio estas plej simpla maniero komenci agrablan konigon. Sed por kiu la konigo estas agrabla...?

Mi haltis kaj donis al li cigaredon. Li prenis kaj malice ridetis. Estis kompreneble, ke li ne bezonis cigaredon. Li bezonis iel mortigi tempon inter tagmanĝa biero kaj vespera veno al fumantaj knabinoj. Studento-okulvitrulo estas tre konvena. Ja li estas neofenda, la studento. Li ne komencos pugnobatalon kun trio, ili eĉ ne volas lin bati, ili volas gaje pasigi tempon.

– Ĉu vi estas ĉi-loka? – dua individuo demandis.

– Jes.

– Ĉu vi iras al hejmo?

– Jes.

Mi insultis min pro unuformaj respondoj. Certe mi devis respondi per kuraĝa frazo, kiu

devigus oligafrenojn silentiĝi, kaj poste trankvile iri preter. Sed mi ankoraŭ ripetas – ili estis trio.

– Aĉetu brikon, bubo! – diris tria plej granda individuo.

– Por kio ĝi al mi?

– Ĝi taŭgos en mastrumo.

– Ĝin mi ne bezonas.

– Sed mi pensas, ke ĝin vi bezonas.

Li efektive tenis en mano ruĝan brikon. En kapo ial aperis demando: “Ĉu ĝi rompiĝos post bato al mia kapo?”

Kion vi farus en mia situacio? Jes-jes, mi scias: per bela bato de piedo vi forbatas dentojn de la unua, per bela bato de mano vi rompus nazon de la dua, sed la tria, kiam vi dirus al li: “Vespero ĉesas esti enua, sinjoro!”, forkuregus laŭte kriante kaj plorante.

Bedaŭrinde dum mia infaneco kaj juneco mi pli ofte ludis per gitaro, sed kimono kaj boksaj gantoj ne interesis min.

– Aĉetu, aĉetu!

– Kiom?

– Dek rublojn.

Mi devis atendi tion. Afero estas ne en prezo, afero estas en situacio. Vendi brikon per dek rubloj – tio estas impone! Estos pri kio rakonti al junulinoj.

Mi elmetis el poŝo dek rublojn kaj donis al la plej granda. Responde li donis al mi brikon.

– Dankon pro aĉeto! – ridis li.

– Dankon al vi. Ĉu mi povas iri?

– Certe.

Mi trairis kelkajn paŝojn kaj ĵetis brikon al flanko. Estas bone, ke ne estis pugnobatalo, sed dek rublojn mi ne bedaŭras, ilin perlaboros.

– He, bubo!

Mi returniĝis. Trio iris post mi. En strato iĝis videble mallume. Ĉu aŭ iĝis mallume en miaj okuloj...?

– Bubo, kial vi ĵetis aĉetaĵon?

– Ĝin mi ne bezonas.

– Vi pagis pro ĝi dek rublojn, sed nun vi

parolas, ke ne bezonas. Se vi aĉetis ĝin, do portu ĝin!

– Bubo, kion vi bezonas?

– Levu brikon!

En voĉtono de la tria estis io, kio devigus min levi brikon. Aromojn de aŭtuno nemulte difektis odoro de malsanulejo.

– Kio plu? – mi demandis.

– Iru al hejmo!

Mi returniĝis kaj iris al hejmo kun briko en mano. Post mia dorso aŭdiĝis Homera ridado.

Kiel ĉi ĉio estas malsaĝe! Mi estas ne timema, sed en tiaj minutoj mian kuraĝon venkas prudento. Kvankam kia ĉi tie estas prudento! Juna okulvitruo kun aĉetita briko pro dek rubloj iras al hejmo, sed trio sekvas lin kaj ridegas. Estas interese, ĉu ili akompanos min ĝis loĝejo? Se jes, do ĉu mi donacos brikon al panjo? Estas malsaĝe, sed precize malsaĝo de situacio gajigas “la intelektulojn” sekvantaj post mi. Kiu el ili elpensis tiun amuzon? Kiu estas tia “saĝa”?

Malnova stalina domo, en kiu mi loĝis, lokiĝis kiel “puto”. En korto ne estas ĝardeneto apud domo, tio estas signo de eĉ ne moskva korto sed la peterburga. En korto kondukis du arkoj, en unu el ili mi eniris. Trio sekvis min. verŝajne ili ne ĉesos...

Ĉu se nun mi returniĝos kaj ĵetos tiun brikon al iu en vizaĝon? Mi ne sukcesis pensi pri tio, kiel ree en aero ial aperis odoro de malsanulejo... Ne, tio estos pli malsaĝe. Ĉu esti batita pro siaj propraj dek rubloj? Ne, tio ne estos!

Kaj se pensi, do briko estas sufiĉe necesa aĵo. Mi metos ĝin en hejmo apud gitaro kiel simbolon de unueco de spirito kaj materio. Verŝajne la briko estos taŭga ankaŭ por io...

– Diablo prenu, mi tre bezonas almenaŭ unu brikon!

Tio estis virina voĉo...

Enirinte al sia korto mi eĉ haltis aŭdinte tiun frazon. Ĉirkaŭrigardinte mi ekvidis

junulinon, kiu staris en konfuziĝo apud blanka aŭto “Ĵiguli”. Ekvidinte min ŝi ekĝojis:

– Juna homo, – ŝi alparolis min, – vi estas mia savanto! Diru, ĉu vi tre bezonas tiun brikon, kiu estas en via mano? Mi devas ŝanĝi radon de mia aŭto, sed submeti nenion. Ĉi tie asfalto havas oblikvecon, mi timas – aŭto deglitos de kriko...

Mi per dorso sentis, ke trio haltis apude kaj kun intereso observis okazanton.

– Juna homo, ĉu vi aŭdas min?

– Jes.

– Ĉu vi povas doni al mi brikon?

– Nu ĝenerale jes, sed...

– Mi uzos ĝin por nelonga tempo, mi nur ŝanĝos radon.

– Jes, certe...

Mi donis al ŝi brikon.

– He, belulino, – vekigis unu el individuoj, – redonu brikon al knabo! Li aĉetis ĝin.

Interalie ŝi efektive estis belulino. Mallongaj helaj haroj, grandegaj grizaj okuloj... Ĵinso kaj leda jako efektive emfazis sveltan staturon... Unuvorte ŝi estis belulino kaj ĉio!

Ĉio...

Ĉi ĉio ne aldonis al mi optimismon. Esti malhonorita antaŭ tiu belega kreaĵo mi ne volis.

– Kio signifas “aĉetis”? – ŝi demandis al mi.

– Mi aĉetis de ili brikon pro dek rublojn.

Estas bone, ke jam venis krepusko. Ŝi ne vidis, kiel mi iĝas ruĝa.

– Por kio?

– Ili decidis, ke ĝin mi bezonas.

– Kaj kio nun?

– Nun mi portas ĝin al hejmo.

– Ĉu sub ilia gardo certe?

– Jes.

Al mi ŝajnis, ke ŝi bonege komprenis situacion.

– Bone. Mi donos al vi dek rublojn kaj prenos de vi brikon. Ĝin mi efektive tre

bezonas.

– He, belulino, – individuoj aliris pli proksime. – Vi monon donos al ni!

– Ne! – ŝi respondis. – Briko apartenis lin sed ne vin, – ŝi kapoklinis al mia flanko.

Ĉu ŝi tute ne timas? Ja ili povas difekti aŭton, batis ŝin aŭ eĉ fari ion pli malbone...

– Donu monon al ni! Donu sen interparoloj. Se ne, tiam estos pli malbone!

Neniam nia korto ŝajnis al mi tia malplena.

– Aŭskultu, Lambastono, ĉu ni veturos en ŝia aŭto? – demandis unu el la individuoj al la plej granda.

Bonega kromnomo! Ĝi tre konvenas al li. Lambastono! Mi tre ĝojas konatiĝi...

– Ĉu vi ne vidas, ke ŝia rado estas truita? Jen se la sinjorino ŝanĝos radon kaj afable konsentos veturigi nin, do verŝajne ni ne rifuzos. Sed komence ŝi donos al ni siajn dek rublojn pro tiu bonega briko.

En buŝo de Lambastono ekbrilis ora dento. Du liaj amikoj ridegis.

Junulino restis trankvila.

– Buboĵoj, ĉesigu ŝercojn, – ŝi diris. – Se mi ne ŝanĝos radon, do morgaŭ mi malfruos laborejon.

– Aha, ŝi ankaŭ laboras! – Lambastono mokis. – Tio estas laŭdinde! Ni ankaŭ volas prilabori!

– Bone. Ŝanĝu radon kaj vi ricevos kvindek rublojn.

– Ĉu-u-u? Ĉu ni devas al vi, virinaĉo, ŝanĝi radon?! – ekkriis la unua, la plej malgranda el ili.

En kompanio tiaj individuoj estas plej inciteblaj, ĉar sentas apogon de la fortaj. Rigardante lin mi pensis, ke se li estus sola, do mi venkus lin.

Dum mi pensis pri tio, unu el belegaj gamboj de la sinjorino impetis supren, kaj la malgranda fleksiĝis poduone tenante sin al loko de kaco.

– Tion vi ricevis pro “virinaĉo”, – ŝi diris.

Al mi ĉiam ŝajnis, ke homo, kiu provas

fari nur logikajn agojn, devas esti tre enua. En aĝo de 19 jaroj mi tre ne volis ŝajni enua. Tial mi simple batis duan kontraŭulon per briko al kapo. Bonokaze ĝi ne rompiĝis.

Pro niaj neatendintaj agoj Lambastono konsterniĝis. Junulino ne permesis lin rekonsciiĝi. Ŝi ŝovis manon en sinon kaj elmetis pistolon. Celante Lambastonon ŝi diris:

– Staru sur loko, kapro! Mi estas el milico!

Al mi ŝajnis, ke eĉ preterirantoj en avenuo de Paco devis aŭdi knaron. Tuŝante unu la alian knaris du solaj cerbaj anfraktoj de Lambastono provante kompreni situacion. “Kial du?” – vi demandas. Ne scias, al mi tiel ŝajnis...

Tamen pro ilia movo li faris erarajn konkludojn:

– Ĉu vi volas timigi min per gasa pistolo, hundino?!

Dirinte tion li moviĝis al ŝia flanko.



Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

Dum mi febre pensis, ke mi devas fari, aŭdiĝis pafo. Antaŭ piedoj de Lambastono aperis fontaneto el asfaltaj eretoj. Lambastono malfermis buŝon kaj konsterniĝis.

– Ne pensu, ke mi maltrafis. Sekva kuglo trafis viajn kojonojn, kriplulo! Sed nun vi kaj viaj amikoj tre rapide malembarasos min de sia ĉeesto. Kaj bonokaze por estoneco mi konsilas forgesi vojon al tiu korto. Se mi

ekvidos vin, do mi arestos! Mi trovos motivon!

Al tiu tempo individuo kun omleto en pantalono jam nemulte rekonsciiĝis, li kaj Lambastono levis la tria. Li ĝemis kaj tenis sin al sangigita kapo. Ial liaj ĝemoj ne ekscitis en mi kompaton...

Trio malrapide foriris el korto. En adiaŭo ili diris nenion, nur Lambastono sovaĝe turnis okulojn.

La amazono kaŝis pistolon en pistolingo, malstreĉe ekspiris kaj donis al mi manon.

– Leŭtenanto de milico Kaĉalova. Povas simple – Helena.

– Fjodor, – mi prezentis min premante ŝian manon. – Dankon al vi.

– Bagatelo. Vi ankaŭ estas bravulo. Ĉu vi ne bedaŭras dek rublojn?

Kvankam estis krepusko, mi ekvidis ludeman esprimon de ŝiaj okuloj.

– Mi ne bedaŭras. Briko estas tre bona.

– Bonokaze kie ĝi estas?

– Jen, – mi levis brikon.

– Ĉu vi helpas al mi ŝanĝi radon?

– Kun plezuro!

Ŝi sufiĉe rapide starigis krikon.

– Helena, ĉu vi ne timis?

– Kiam homoj parolas, ke ili ne timas, do ili malhoneste mensogas. Certe mi timis, sed tio estas mia laboro.

– Kiel vi trafis kriminalan esplorservon?

– Mi havas kronikan mankon de adrenalino kaj ankaŭ akran senton de justeco, – ŝi ekridetis. – Ĉu vi havis tion?

– Ne. Mi dume estas studento...

Dum interparoloj ŝanĝo de rado pasis sufiĉe rapide.

– Ĉu vi ĉi tie loĝas? – mi demandis ŝin viŝante manojn.

– Ĉi tie loĝas miajn gepatrojn. Jen en tiu enirejo. Ili forveturis dum kelkaj tagoj kaj petis gardi loĝejon. Mi alveturis kaj ie truis radon. Ĉi tie ĉirkaŭe estas nur asfalto kaj neniom ŝtono. Sed, glori Dion, vi kun briko

aperis ĝustatempe.

– Vi aperis ĝustatempe, – mi konfuziĝis.

– Ne emociiĝu, vi kondukis inde.

– Sed ne tiel, kiel vi.

– Ne forgesu, ke mi estas el milico. Tio estas mia laboro. Kaj mi havas pistolon.

– Ĉu vi ŝatas armon?

– Mi ŝatas aventurojn. Por iuj miaj kunlaborantoj pistolo iĝis akcesora seksa indico, sed por mi armo estas rimedo por atingo de difinita celo. Kaj ne pli ol tio...

Ŝi forigis truitan radon al pakajujo kaj iel strange rigardis min:

– Iru al mi. Ni trinkos kafon, – ŝi diris.

– Dankon, sed mi nemulte ĝenas min.

– Fjodor, ĉu vi ĉiam estas tia nedecidema?

Pro veninta mallumo mi ne povis vidi esprimon de ŝiaj okuloj.

– Por homo, kiu aĉetas brikojn kaj komuniĝas kun virino, kiu havas pistolon, tio estas ne limo, – mi diris.

– Vi bone diris! Ĉu vi iras?

– Jes, ĉar inter ni estas negranda diferenco...

– Kia diferenco?

– Mi ŝatas nur agrablajn aventurojn!

Ŝi ridetis. En korto dum unu momento iĝis lume, kaj al odoroj de aŭtuno aliĝis karesema aromo de ŝia parfumo...

Kiel oni ŝatas ripeti? “Kion faras Dio...”

Ĉu vi scias, kion mi faris matene, kiam eliris el ŝia enirejo?

Unue mi atente kaŝis peceto de papero kun numero de ŝia telefono, due elmetis brikon el sub rado de aŭto, kiun ni forgesis antaŭtage kaj portis ĝin al hejmo.

Ja la aĵo estas simbola kaj en masrtumo necesa...

notoj:

1. *Batman* – fama heroo de usona komikso.

2. *Ĉackij* – heroo de fama verko “*Malfeliĉo pro saĝo*” de rusa poeto Griboedov.

3. *Arnold Schwarzenegger kaj Brus Li* (angle Bruce

Lee) – famaj aktoroj de furorfilmoj.

4. *Stalina domo* – domo, kiun oni konstruis en tempo de Stalino.

Esperantigis



Igorj Ĥomjakov

(Rusujo)

Gratulaj vortoj el niaj legantoj:

Tan Xiuzhu: Pardonon pro mia forgesemo kaj neglekto al via atentigo pri la jubileo de Penseo. Bonvolu akcepti mian malfruan gratulon pro la apero de ĝiaj 300 numeroj.

Dum la longa tempo post sia apero, Penseo, kiel verda ĝardeneto en ĉina Esperantujo, restas ĉiam delikata kaj kvietaj, kiel ajn ŝanĝiĝas, eĉ haosas la ekstera mondo. La kulturaĵoj en ĝi estas riĉaj je koloroj kaj specoj, senescepte beletraj. Promenante en ĝi, mi kun plezuro ĝuas la kreskaĵojn, eĉ kiam mankas al mi bona scio kaj plena kompreno pri iuj specoj, mi tamen povas tie ripozigi min kaj esti infektita de la kultura etoso kaj sentoj elspirataj el la plantoj en la ĝardeno.

Ĉi-momente mi volas diri "Koran dankon" al ĉiuj redaktoroj de Penseo. Sen via diligenta laboro, sen via persistemo, fervoro kaj fideleco al nia lingvo, ni ne havus Penseon, oazon en la Esperanta Komunumo. Via laboro montriĝas aparte valora kaj signifoplena en la nuna mondo brua!

Kun granda respekto kaj admiro mi deziras al vi sanon, kaj prosperon al la revuo!

Dennis Keefe: Ne nur gratulon al vi kaj al la teamo kiuj eldonis Penseo-n 300, sed ankaŭ gratulon al ĉiuj kiuj longe verkadis dum ĉirkaŭ 26 jaroj, kio videblas en la sekva retejo kun ĉiuj 300 numeroj : <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm> . La antikva poeto Li Bai, pere de tradukoj de Sinjoro Guozhu kaj de aliaj, legiĝas ekde la unua numero en 1990. Estus bone se eŭropaj Esperantistoj ekkonu la verkon de li. Estus bone ekkoni la

